**Protokolo de la 36-a Ĝenerala Asembleo** de la Scienca Sektoro de AIS okazinta en Rimini (IT) dum SUS 30.

Kunsidtempo: Vendredo, 2007-09-07, 16:50–19:20 kaj 21:00–24:00.

*1) Formalaĵoj*. La asembleo okazas laŭ la kunsidregularo, sed pro limigita tempo disponebla je la ferma tago de SUS ĝi okazas jam unu tagon antaŭe, kiel anoncite en la SUS-programo. La kunsidon gvidas vicprezidanto OProf. Minnaja; la protokolon verkas OProf. Fössmeier. La tagordo estas tiu laŭ la kunsidregularo (1.8). La asembleo estas kvoruma laŭ artikolo 9.6 de la konstitucio, ĉar la tagordo enhavas la elekton de nova senato.

La asembleo akceptas la proponon de OProf. Wickström, ke ĝis klarigo de la stato de sia servobonhavo OProf. Holdgrün havu la rajton partopreni kaj voĉdoni en la ĜA.

OProf. Holdgrün petas enmeti en la tagordon la decidon pri apelacioj kontraŭ du decidoj de la Senato. La asembleo akceptas la proponon.

Du ĉeestantoj estas akceptataj kiel gastoj.

*2) Ĝenerala raporto.* OProf. Minnaja raportas, ke pro la serioza malsano de prezidanto Frank la Senato de unu jaro laboras nur kun kvar personoj.

Dum kunsido en Sibio en marto la Senato subskribis intencdeklaron pri kunlaboro kun Fondaĵo Bavara-Rumana. Intertempe montriĝis, ke tiu kunlaboro ne estas tuj efektivigebla.

Membroj de AIS partoprenis en scienca konferenco en Kaunas.

La rilatoj de AIS kun ILEI pliintensiĝis, kion nelaste montras la partoprenano de ILEI-estrarano OProf. Mauro La Torre en SUS 30.

Dum la Universala Kongreso de UEA en Jokohamo denove okazis la Internacia Kongresa Universitato AIS-IKU kunage kun AIS. Interalie kontribuis SUS-ano Dr. Macko.

La Senato bedaŭras, ke en la lasta jaro ne aperis la revuo Acta Sanmarinensia. Antaŭ kelkaj tagoj aperis tre bone redaktita kajero, kiu estas la lasta fasciklo de la jarkolekto 2004. La aperritmo do konsiderinde malfruas.

La Esperanto-centro de San Giuliano proponas al AIS ĉiujarajn kunvenojn tie, sed bedaŭrinde la laborforto de AIS ne sufiĉas por tio.

La vicprezidanto dankas al la ekzamen-, klerig- kaj informofico pro la laboro farita en la lastaj jaro kaj senatperiodo kaj invitas la AIS-anojn regule viziti la retejon de AIS.

*3) Financa raporto, senŝarĝigo, buĝeto.* OProf. Wickström prezentas la spezkalkulon kaj la bilancon pri 2006.

La asembleo sen kontraŭvoĉoj akceptas la spezkalkulon kaj la bilancon kaj senŝarĝigas la Senaton je la kondiĉo, ke la revizoraro ne konstatos gravajn problemojn en la librotenado. Je la sama kondiĉo ĝi rekomendas al AIS Deutschland la sensarĝigon.

La buĝeto por 2008 estas simila al tiu de 2007 kaj antaŭvidas modestan malgajnon por ne pagi impostojn. La asembleo akceptas ĝin sen kontraŭvoĉoj.

*4) Decidoj pri senataj proponoj.* Por SUS 30 ekzistas invitoj al San Giuliano, Karlovo kaj Banja Luka (BA). La Senato rekomendas akcepti la inviton de EProf. Preradović al Banja Luka por la komenco de septembro 2008. La asembleo unuanime akceptas.

*5) Aliaj decidoj.* Estas apelacioj kontraŭ du decidoj de la Senato:

a) ADoc. Joanna Lewoc deklaras, ke ŝi eksciis nur je 2007-09-06 pri sia forpelo el AIS, okazinta en 2004. OProf. Holdgrün deklaras, ke li jam delonge sciis, sed ne informis ADoc. Lewoc.

La asembleo kontraŭ du voĉoj akceptas trakti la apelacion. Ĉar ne eblas tuj decidi pri ĝi, la asembleo decidas, ke la sekvoj de la forpelo estu suspenditaj ĝis decido pri la apelacio. La Senato informu Mag. Lewoc pri la riproĉoj faritaj al ŝi; ŝi petas, ke tiuj informoj estu senditaj al OProf. Holdgrün, Mathematisches Institut, Bunsenstraße 3–5, 37073 Göttingen.

b) OProf. Holdgrün protestas kontraŭ tio, ke AIS forprenis de lia servobonhavo la librotenan valoron de la komputilo iam akirita por la protokolofico. Li asertas, ke la komputilo ja estis en lia posedo, sed konfidita ne al li, sed al Mag. Lewoc, tial li ne respondecas pri ĝi. Li postulas redonon de € 1079,98 (la librotena valoro) al sia servobonhavo kaj pretas pagi nur € 600,00 laŭ la merkata valoro. OProf. Holdgrün akceptas sub tiuj kondiĉoj kaj plia, ankoraŭ precizigota, ankaŭ redoni la ĉe li restantajn ekzamenoficajn aktojn.

La asembleo decidas ne ŝanĝi la koncernan decidon de la Senato.

*6) Elektoj.* La asembleo decidas, ke en la nova senato estu kvin senatanoj kaj ses vicsenatanoj.

Per sekreta baloto la asembleo elektas senatanoj la profesorojn Fössmeier, Minnaja, Pennacchietti, Quednau kaj Wickström.

Same per sekreta baloto estas elektitaj ses vicsenatanoj en jena malkreska ordo:

Maitzen, La Torre, Lobin / Angstl, Poláková, Roux.

La asembleo decidas ne rekomendi al la nova senato prezidanton.

Kiel unuan revizoron la asembleo elektas ADoc. Dr. Macko. Elekton de la pliaj revizoroj ĝi komisias al la Senato, kiu decidu akorde kun ADoc. Macko.

*7) Diversaĵoj.* La sekva kunsido okazu dum la sekva SUS en la SUS-ejo.

Rimini, 2007-09-07
*C. Minnaja, kunsidestro*
*R. Fössmeier, protokolanto*